

Sekve de la kompilaĵo « Laŭvojaj tekstoj » kaj de la kunmetaĵo « Eldonitaj tekstoj », jen tria parto koncerne mikronovelojn.

La unua serio estis verkita inter la jaroj 2000 kaj 2007-aj kaj aperis en la libroj, « Kronikoj el mia tirkesto » kaj « Poemaj dilemoj ». Tiuj estas noveloj nek laŭ la formo nek laŭ la longeco, ĉar tro mallongaj. Sed ili ne estas mikronoveloj ĉar evidente tro longaj. Ilin mi nomas noveletoj aŭ *milinoveloj*. Mi do stucadis ilin ĝis ili rajtis kandidatiĝi kiel mikronoveloj, eĉ se plu obezetaj (averaĝe duoble tro longaj).

La duan serion mi komencis ĵus antaŭ la koronviroza epidemio, kiam konato alvokis min demandante « Kio estas mikronovelo ? », ĝuste kiam mi estis studanta la esprimon de la tempo en Esperanto. Mi tajpis « Verŝajne » kaj tuj sendis al la konato. Fakte ĝi estis ne nur respondo al demando, sed trafa ilustro de mia tiama studado (efektive, loki en la tempo ion neniam okazintan kaj klarigi la kaŭzaran kronologion de tio neokazinta estas apriorie malfacile, des pli en cent vortoj maksimume). Sekve, kuraĝigite de la premiigo de « Verŝajne », mi iam-tiam pluigis la mikronovelan aventuron.

Evidente la senprofita reuzo (ekz. en kursoj), dissendo (ĉu papere ĉu rete) estas entute libera private kaj asocie. Male al « Laŭvojaj tekstoj », mi deziras ke tiuj plu restu nemodifitaj.

Bonan legadon.

la 9an de decembro 2022-a

C. Rivière

El « Kronikoj el mia tirkesto » (2004)

*La kasistino* / laŭ originala ideo de Jacques Krier (1927-2008)

*Danĝeraj ludoj*

*La fontanoj de l' Edeno*

*Elvoras la rusto, enkoras la vundo*

*Tra la glaco*

*La lasta guto*

*Reciproko*

*Ankaŭ aliaj vekigās frue* / laŭ originala ideo de André Benedetto (1934-2009)

*La ruĝ-jupulineto*

*Le petit juperon rouge* (traduko en la francan lingvon)

El « Poemaj dilemoj » (2007)

*La nigra ŝalo*

Novaj (2019-2024)

*Versajne*

*Neprobabla renkonto*

*Skeleto soifas*

*Laŭmorale*

*Vilaĝa kroniko*

*Recepto*

*La nova religio*

*Antaŭŝento*

*La nuklea erao*

*Lastspira petolo*

*Ŝtrumpeta problemo*

*Malĉeesto*

*Mi scipovus*

*Sine de popolicido*

## La kasistino

La kasistino de granda magazeno timas ke ŝia koro ne eltenos ĝis amo trafos.

Ŝi ne povas akcepti tian vivon en mondo esperosena. Ĉe la horizonto nuboj amasiĝas, obstrukcas la estontecon.

Finiĝas la labortago, sen bela nokto en perspektivo. Nur la kaso-registrilo kantas en ŝia kapo, nur adicioj dancas en ŝia menso.

Ĉiuj virinoj de la kvartalo pasas antaŭ ŝi, maltrankvilaj pro mona nesufiĉo, ĉiuj sendunguloj de la avenuo, hontaj pro la magraj pensioj. Neniu krompagas rideton, aldone la monerojn. Fine de la tago, neniŭ rideto en ŝia kasokesto, sed milionoj da eŭroj. Ŝi estas ligita al sia kasregistrilo kvazaŭ insekto ĉe sia floro.

Ŝi ja povus kanti operajon, ĉar bela estas ŝia voĉo. Aŭ ridegi ; ŝi scipovas ridi. Aŭ deklami unu el tiuj poemoj parkerigitaj en lernejo ... Sed ŝia dorso doloras pro movo de tunoj da varoj antaŭ la strekokoda detektilo. Cetere, ŝi certas ke la vespero ne alkondukos al horizonto pli interesa ol hieraŭ. Nek fabelos sonĝo zorgosena, nek krepuskos mondo alispeca. Nur mateno banale ĉiutaga, en mondo ne farita por ŝi.

Tiam ŝi timas ke ŝia koro ne eltenos ĝis amo trafos.

Momente ŝi devas repagi monerojn al tiu virino, kiu ne povis aĉeti ĉion bezonatan. Jen tiom kaj tiom por tiu virino kiu ne konas la feliĉon ...

Ŝi volus ŝanĝi la mondon kun la aliaj, kiel ili komencis iun dimanĉon en manifestacio. Nun ŝi timas ke ŝi estos tro maljuna kiam ekfloros la feliĉo.

Ŝi demandas pri la kosto de vinbotelo sen strekokodo. Por juna viro kun okuloj alipejzaĝaj, kaj buŝo ŝajne kisosperta. Ŝi tajpas nul. Nereteneble per montro-fingro. Nul, nul, nul, nul ...

Donaco ! mildas ŝi al la juna viro. Ŝi ekstaras kaj kuniras lin laŭ la avenuo. Dume, ĝis la fino de la tago, la klientoj daŭre viciĝas antaŭ la forlasita kaso, ĉiuj silente, krom knabineto kiu komentas : "Fakte, ankaŭ mi timas ke mia koro ne eltenos ĝis amo trafos ..."

## Danĝeraj ludoj

Ni promenis laŭ tiu sinua pado, rande de la roko antaŭ la nigra kavo. Dekjara mi aĝis, mia kamarado apenaŭ naŭjara. La cetero de la bando sekvis braklule. La grundon skrapis la galoŝoj. La arboj etendis siajn branĉojn horizonten, al nia senzorga estonteco.

Furoris inter la geknaboj tiu ludo senaverte timigi alian, afektante puŝon de tiu ĉi. Precipe knaboj knabinojn. Post diskreta alveno de malantaŭe, du manojn ĉe ŝiaj koksoj, neatendite puŝetis al vepro, al rubusarboj, al urtikoj. Lastmomente retenis la manoj.

Ĉe la roko, komenciĝis fanfaraĵo alispeca, nur knaba ĉi-foje. Kiu plej proksimiĝis al la iom sabla rando ricevis de la knabinoj, lavangon da entuziasmaj laŭdoj. Ekdeklivo devigis la ŝuojn mallevi siajn pintojn, la plandumojn sin streĉi en iluzia blok-bremsado. La faŭko de la kavo malhelis sube, kvazaŭ sovaĝa besto atendanta sian predon. Ene de la roka palato, ie tie dentis pintaj branĉoj de arbustoj. Laŭpaŝete, akriĝis la danĝero. Neforgeseblaj tagoj !

Cetere, niaj gepatroj nin forgesis por ĉi-sezonaj okupoj, liberigis siajn korojn sub arboj, adult-gee, ajne-kune, mise-dise, kaŝe-kise. Hazarde de piedmigrado, la unuaviculo subite statuiĝis, barante la vojon al la grupo kiu retropaŝis plej silente, kaŝobserve malantaŭ filikoj. Paron da niaj gepatroj ni plurfoje tiel ŝtelvidis. Nin ili neniam. Dorson ĉe arbo, korpon en ardo, ili senprudente lasis sin fali en la vorantan abismon de l' amo, sinke al iu providenca tapiŝo muska, ekster la luko de nia folia gvatejo. Ni tiam komune decidis reiri laŭ la pado, ĝis la rando de la roko, antaŭ la nigra kavo.

Neniam iun el ni trafis falo en la kavon. Krom multajn jarojn poste, sed mildige de muska tapiŝo.

## La fontanoj de l' Edeno

Manosvingo tra la vitro ĝisbaldaŭas al Nadja. Kiel ĉiusemajne de monatoj, de jaroj, ŝajne de eterno. Li rezignacie enspiras la freŝecon de la klimatizado. Lia amo al Nadja plurestos dutagaj streketoj. Nur semajnfine ili intimas. Lunde matene, li kosmo-lifte reiru al sia oficejo sur la transoceana kontinento.

Li bukas sian sekurrimenon utilan nur por ne esti vertikale ŝetita al la plafono dum la sorfina malakcelo. Li relegas la informan faldaĵon pri la Historio de la lifto, disponigitan al ĉiuj vojaĝantoj, kvankam li ĉion scias delonge: *"Konstantin Tsiolkovsky fikciis pri la sistemo en 1895, ... Juri Artsutanov skizis la unuan projekton en Pravda en 1960, ... John Isaacs ĝin specifis en 1966, ... Jérôme Pearson en 1975, komisiite de la Aerarmeo, teknike konceptis, ... la furora romano de Arthur C. Clarke, La fontanoj de l' Edeno, profetis al la publiko, ... ekkonstruiĝis la unua lifto en 2080"*. Li distre konsultas la teknikan priskribon: *"gvido-kabloj el nanotuboj, centoble pli rezistaj ol ŝtalo, ... 36000 kilometrojn longaj, streĉitaj pro la rotacio de Tero, kun gravito-centro ĉe geosinkrona orbito, ... supre la kabloj finiĝas per stacio, ... tergrunde fiksitaj en ekvatora regiono, ... notinde la kajuto ne tuŝas la kablon dank' al magnetismo, ... inter du stacioj atomenergia propulsado de superfulmaj navetoj, ... kaj denove sob per alia lifto aŭ for al la senlima spaco, ..."* Fu ! Eĉ 2070-ano tion sciis. Dum la foliumado, li ne konsciis pri la supreniro nek pri la terura akcelo de la lifto.

Nadja malaperis de lia vido. Nadja ! Ŝia svelta figuro sur la kajo, ŝiaodoro, ŝia varmo daŭre flirtas en lia menso.

Ha ! Se ne ekzistus religioj ! Nek iliaj ritoj kaj kultoj, nek dogmoj kaj sakramentoj !

Ĉiusemajne lian gorĝon premas la adiaŭoj. Li scias ke Nadja neniam akompanos lin. Ŝi ne rajtas. La Rigoristoj regas, diktas siajn leĝojn, malpermesas al la virinoj vojaĝi per kosmo-lifto. Laŭ la sanktaj principoj preskribitaj en la Tekstoj, la virinoj ne alproksimiĝu al Dio, ne refreŝiĝu ĉe La fontanoj de l' Edeno.

## Elvoras la rusto, enkoras la vundo

Lastafoje li navigas sur sia ŝipo, finopunkte de tuta laborvivo. Li pezpaŝe vaĉas sur la jam rustinta ferdeko, momente kubutas sur la pavezo. Neniam plu la ondo lekos la ŝelon, frakase laŭ la lul-ritmo. Neniam plu klakos la veloj en la vento. Ekbolas salaj larmoj ĉe liaj okuloj. Nereteneble pro emocio. Li revenas havenen kun ŝipokelo plena. Fiŝkaptado estis lia vivo. Hodiaŭ estas la lasta tago.

Jam flagras horizonto la unuaj lumetoj de la haveno. Kun ĉi-foja nuanco de respekto, bonvenige salutas kelkaj mevoj spalire flugantaj. La fiŝojn li forvendos, krie-laŭde pri la kvalito. La ŝipon li rezignos senmarĉande. Parton de la mono li perbieros ĉe starotablo de la trinkejo, kaj revenos hejmen, fallitiĝos pro ebrio, dormos ĝis la mateno.

Morgaŭ li estos nova homo, sed kun koro jam rustinta. Lanta navigo ekdrivas, ĝis la lasta haveno.

## Tra la glaco

Restas nuraj sekundoj. Tuta vivo kalejdoskope karuselas. *La infanoj, la edzino, la hejmo, ... la rendezuo. Tiuj konataj, iuj iam renkontitaj, jam mortintaj, ĉiuj kune en stranga kirliĝo. El ĉio travivita, momente miksiĝas scenoj. Rolantoj senrilataj fulmas senorde el estinto, el iu forgesita iamo, kvazaŭ marionetoj mutaj en surdiga silento. Iuj amikas, iuj ridaĉas, iuj obtuze krias, ŝajne sorĉodancas. De malantaŭ la vitro, kelkaj provas alarmi, klopodas bari la vojon al la fato, manerepuŝe, sed tiel malhelpas al la rendezuo, lia celo, al ilia rendezuo, ... al ŝi !!*

La bremsan streĉon premas la piedo. Hurle, vane. L' asfalto ebenas glite-jore. Savon provas streĉi. La radoj malobeas spite-kriĉe.

Drame grandiĝas la bufro de l' antaŭa veturilo. Fluetas vivero tra la fatala funelo. Pluvero larmas ĉe la glaco, vualante l' akcidentan tujon. Lastan rekton al sia sorto spektas la stirant ...

## La lasta gutto

Li ne dormos, nur rezignacie gustumos la lastan guton de sia vivo. La krano de la lavkuvo liksekundas en la silento. En la forno brulas la lasta ŝtupo.

Li rigardas al la fenestro. Sub ĉielo lumoplena, lupobleka, neĝo oblikvas flirte ĉirkaŭ la korta arbo. Tiu ĉi, tute nuda, majeste ignoras la froston. Ankaŭ ĝia trunko suferos morgaŭ pro la kugloj, oferos sian ŝelon, certe ne plendos.

Tiun arbon li delonge konas. Sur ĝian branĉon, li somere grimpis kun aliaj infanoj de la vilaĝo, malgraŭ la gepatra malpermeso. En ĝia ombro, li pace siestis kiam la lokon aroge invadis la soldatoj. Ĉe ĝi, li morgaŭ estos firme ligita, mortpafita. Etna milito daŭre tondras, hejman enŝloson trudas. Najbaroj, hieraŭaj amikoj lin denuncis. Li neniam parolis malgraŭ la torturoj, neniam cedis antaŭ la milicio, daŭre mutas en la nokto.

Angule de flokoza ĉielo, heletas iu nepreciza Luno, svage ronda. Ankaŭ ĝi restu vualita, kaŝante sian vizaĝon obtuza, ĉadore sian virgecon makula. Eĉ tie supre regas nebulo malklera, maskla, maskema. Maskerado barbara, barbulara. Tuta socio-flanko agonias sub la mortotuko de la ĉiesa ignoremo.

Nur kelkaj ĝuos la printempon, plu malvelkos. Jam verkiĝas sur la neĝa paĝo la unua paŝo al ilia estonto, al alia horizonto utopia. Sed ĉi malfirma spuro prudente viŝiĝas, ankoraŭ tro avangarda. Certe pluraj skizoj necesos, antaŭ definitiva desegno de pli bela sezono, antaŭ daŭra florado de paca feliĉo, ŝosado de vivebla mondo.

Ĉi-nokte la vento flustras al la vivontoj ilian futuron. Li fermas siajn okulojn, streĉas la orelojn. Sed la aŭguro lin ne koncernas. La vortojn li ne komprenas. La fremdan lingvon uzas la orakolo, tiun de la alia gento, ne la lian. Liajn samulojn ekstermos la venka armeo antaŭ la komenco de la flustrita estonteco.

Lia nura amiko staras sole en la korto. Tiu fidele salut-svingis siajn foliojn al li, je eĉa ventotremo. Ĝi nun malvigle moviĝetas, triste adiaŭas, kiel nura atestanto de lia vivo, de ties mizera fino.

## Reciproko

Li estas gardisto sidanta antaŭ ekrano. Li zorgu pri ĉiuj oficejoj de la firmao, pli ĝuste pri ĉiuj homoj, interalie pri ŝi. Ŝi sidas tutan tagon antaŭ ekrano, sed tiu ĉi ne estas videbla de li, ĉar ekster la angulo de la kaŝita kamerao.

Ŝi estis rekrutita por atenti pri ĉies konduto kaj akurato, interalie por raporti pri lia fideblo. Ŝi tiucele fikse rigardu lin en ekrano, el kamerao diskrete kaŝita liadekstre. Sed lian ekranon ŝia vido ne atingas.

La estraro volas esti tute certa pri la bona funkciado de la dungitaro. Ĝi la reciprokon elpensis sekure kaj asekre. Du anonimaj oficistoj inter centoj, kies kroma tasko estas gardi unu la alian. Jen duobla garantio.

Iun tagmanĝon, sidloko liberis antaŭ ŝi. Rideto invitis. Ili banalumis, unue rezerve, poste pli libere, fine malkovris pri la reciproko. Ili amikis kaj komplicis, intimis kaj kunloĝis, fine samlitis.

Maltrankviliĝis la estraro pro la ĉiutaga kunmanĝo, sed neniel kapablis ion riproĉi al la paro, cetere ne povis riski publikigon pri diskutinda spionado-metodo, kaj raporton pri atestindaj okazaĵoj tro kompromitaj.

Tamen, tria ekran-gardisto estis dungita. Sekure.

## Ankaŭ aliaj vekigās frue

Iun matenon, por veturi pli malproksimen ol kutime, vi vekigās frue. Ankoraŭ noktas. Krome frostas. Vi vestas vin kaj matenmanĝas. Senkrake, sensmace, sengluge, senfrote. Sene-glute. Tre rapide kaj diskrete por veki neniun. Sindetene, memcenzure, eĉ honte pro ĝeno de la ĉirkaŭo dormema. Vi agas iom robote, preskaŭ sen konvinko.

Vi prenas viajn aferojn, mallumigas kaj eliras, vane provas dampi viajn paŝojn sur la pargeto de la ŝtuparo. Vi retenas la enirejan pordon kontraŭ puŝo de trablovo. Neniu videblas en la kvartalo. Vi perceptas ke vi estas la sola homo vekita. Kaj vi eniras vian aŭtomobilon, startigas la motoron kiu, ŝajne al vi, ŝiras la silenton. Disviŝado de la roso ĉe la glaco, kluĉado felisa. Vi enprofundiĝas en la nokton, kvazaŭ esploristo en nekonatan ĝangalon. Sole, kuraĝe, akrasente !

Jen ombroj sub stratolampoj. Vi renkontas aŭton, jen duan. Alia preterpasas vin. Sendube iu urĝita, malkvieta, stresata. La vivo naskiĝas ĉirkaŭ vi. La trafiko dislume densiĝas, progresive strukturiĝas. Proksime al la stacidomo, jen trinkejo jam malfermita. Kaj dua kie matenas kafejoj startablaj, en diskuto flama pri refaro de la socio. Ekstere, trotuaras paŝantoj discelaj. Preskaŭ svarme !

Vi kredis vin sola sur ĉi strato, sed milopas aliaj, ĉiu laŭ propra trajektorio. Vi sciis tion antaŭ ol elhejmiĝi, tamen vi miras.

En sia aparta mondo, la ideoj same elmensiĝas. Vi sidas antaŭ via tablo, vi koncipas ideon, diskrete ĝin ovumas, vi estas fiera pri ĝi, vi ĝin frandas, kolorigas per ribelo, ornamas per kontesto, per ĝi ĵonglas avangarde. Vi certe ne scias ke sammomente, aliaj plumoj hezite skrapas, aliaj globkrajonoj ruliĝe febras ideojn iom malsamajn sed samdirektajn, ŝiras la silenton de la socio. Jam matenas ideoj kuraĝe discelaj, time dampitaj en la obskuro, kiuj frue vekigās kaj progresive konverĝas, nekonscie kunretas, jam proteste surstratas.

Naskospire blovas Revolucio.

## La ruĝ-jupulineto

Petveturo (trivorta skeĉeto)

Nur punkto ekstreme de la vilaĝo, trans la vojkrucio. Jen petveturanto. Tamen la ŝoforo jam subkonscie ekflaras bonŝancon. Pri la ineco de la figuro, li fakosperte jam ne plu dubas. Febro subita lin inundas. Ej, fakte ĉarma. Ne, pli ĝuste ... alloga. Nu ! ... seksalloga ! ŝminkobuŝa, minijupa, kurtabluzo, ventronuda, sunobruna, ledo-ruĝa. Neniu konkurenco antaŭvica. Kuirprete : predo lia.

Li bremsas, flanken-stiras ŝianivelen. Malfermiĝas la dekstra pordo, inviteme :

— *Kien ?*

Ŝi paŭtridetas lascive, palpebrumas engaĝe. Ajnvole ŝajne. Ŝia brako perfingras al l' vakuo :

— *Rekten.*

Li, lupodente, langopende :

— *Enaŭten.*

## Le petit juperon rouge

Auto-stop (sketch à trois répliques)

A peine un point en sortie du village, après le carrefour. Tiens donc, un autostoppeur. Mais déjà il flaire le bon coup, d'expérience. Sur le genre de la créature, il n'a plus de doute. La fièvre l'inonde. Wouah, charmante. Non, plutôt ... attirante. Que non ! ... bandante ! Rouge à lèvres, mini jupe, chemisier moulant, nombril à l'air, peau halée, cuir rouge. Pas de concurrence en vue. Une proie facile : c'est tout cuit.

Il freine, se range sur le bas-côté, à son niveau. La porte s'ouvre côté passager, comme une invite :

— *Où tu vas ?*

Un sourire engageant, clignement de cils, moue lascive. N'importe où en fait. Son bras montre le vide :

— *Par là.*

Il bave, il a les crocs, une faim de loup :

— *Monte.*

*Originale en Esperanto*

## La nigra ŝalo

Nigra ŝalo daŭre vualas mian vidon. Ĝi flirtis ĉe nuko fajne pala, karese venton adiaŭe. Laŭ padoj sinuaj de ludo postkura. Sur herbo freŝa por vervo kuŝa. Sed la ŝalo foriris al haveno fremda, al tajdo sturma de ĝuoj perfidaj. Ĝin mi perdis sed ĝi daŭre flirtas al mia menso. Restas plu nur inko nigra sur papero blanka, vortoj grizaj pri ĉi tagoj helaj.

Majon 2006-an

## Verŝajne

Miaj gepatroj arigis en si ĉiujn homajn kvalitojn. Ili kvazaŭ simbioze kompletigis. Objektive, oni almenaŭ rekonu, ke la evidentan senzorgecon de mia patro, kompensis la konata memfido kaj efektiva fidindo de mia patrino.

La someron antaŭ mia naskiĝjaro, mia patro maltrafis la starton de alloga krozado, en kiu mia patrino estis pasaĝero. Kun sia valizo en mano kaj memriproĉoj en la okuloj, li korŝire konstatis, ke la ŝipo jam nereteneble foriras al la oceano.

Kiel konfirmis poste miaj du pliaĝaj gefratoj, se nia patro ne havus tiun fuŝan inklinon maltrafi jen ŝipon, jen nokto-trajnon, jen aviadilon, ni verŝajne estus naskitaj.

Premio Paula Adúriz / Belartaj Konkursoj 2019  
<https://www.youtube.com/watch?v=-66f4OUS7mY>

## Neprobabla renkonto

— Ave !  
— Hugh !

## Skeleto soifas

Skeleto eniras trinkejon kaj alpaŝas startablon.

— Kelnero, bieron mi petas.

La kelnero alportas duonlitran. La skeleto deprenas la bieron kaj ĝin poglutus avide.

— Kelnero, viŝtukon mi petas.



## Laŭmorale

Stomako fasta, krimo fuŝa. Laŭsperte krimo necesigas klarvidon kaj saton. El la tirkesto mi prenas efikan tranĉilon, zorge ŝmiras buteron sur panpeco, ĝin mergas en kafon.

Mi ne bone dormis lastan nokton. Kiam mi devas elekti mian viktimon, ĉiufoje dormi estas malfacile. Ja hodiaŭ mi decidu, sed kiun, ... kaj kiupretekste, kiuarmile, kiukonvikte ... ?

Stomako sata, plano skiza. Ĉio bonordiĝas. Ĉar konstateble mortigo ne plu konvenas en la nuna socio moraldogma, mi adaptiĝu al l' epoko.

Mi komforte sidas antaŭ mia ekrano, klakas impete, klavas senkompatate.

Mi mortigos neniun, sed mia scenaro vojigos la policon al murdunto arbitre suspektinda.

Honora mencio / Belartaj Konkursoj 2022

## Vilaĝa kroniko (Krimonovelo)

En la domaro situanta ekstreme de la vilaĝo, ĉe la bordo de la rivero, vivis tri virinoj, unu vidvine maljuna, unu alloge mezjuna, unu virge juna. La unua estis malhele vestita. La dua sin ŝminkis por sia amato. La tria plektis siajn harojn flugantaj en la vento. Jam dek jarojn, la unua mortigis la du aliajn.

La duobla murdo diskaŭzis psikozon en la tuta regiono. La onidiro proponis klarigojn. Sed la polico fuŝkonjektis kaj neniam sukcesis bori la misteron.

Pri tiuj virinoj, mi ne bezonis ekscii la historion per onidiro aŭ el gazeto. Interalie ĉar unu el ili estis mi.

## Recepto

Dietece garnu la entreon per apenaŭaj pistaĵoj papil-vekaj.

Dissaŭcu la sekvon per subtila devojiĝo al saporo kondimente flanka, spice erariga, mise distra.

Desertigu la ingrediencojn de la enkonduko kaj servu plej surprizan menuo-epilogon.

Jen finbakita mikronovelo.

## La nova religio

La predikanto de la nova religio asertas ke ĉiu homo ricevas senkomencan vivon de la infinita pasinteco ĝis sia naskiĝo. En la antaŭnaska Eternejo, bonfarontoj ĝuas paradizon, duon-pekontoj stagnas en purgatorio kaj estontaj fiuloj terure suferas en infero.

Referencante supozatan pra-evangelion, li sagace aldonas ke ĉies vivo alkonformiĝu kun ties antaŭnaskiĝo, ĉar ĉion planis ĉioscia Dio, kiu rigore malhelpas eĉ malgrandan devojiĝon.

La predikanto ĉuas pri eventualaj demandoj el la ĉeestantaro. Funde de la kultejo, anonimulo scivole levas la manon kaj demandas pri "kio post la morto" ...

Sur la irota vojo de ĉiu serioza religio fatale sin trudas herezaĵoj.

## Antaŭsento

Vekiĝe mi antaŭsentis ke tiu nova tago estos aparta. En mia konscio tiusence ŝvebis io nekutima, io apenaŭ perceptebla. Tra la fenestro, la rutino jam survojis. La pasantoj urĝiĝis al siaj ĝisvesperaj taskoj. La nuboj ploretis oblikve pro la neforta vento.

Sunzenite la nekutimeco de la tago konfirmiĝis. Mi laŭsperte tiajn tagojn detektas instinkte. Tiu ĉi certe fluos laŭ ĉi mia aŭguro. Ĝi tutŝajne estos escepta.

Laborfine, la najbaroj pezpaŝe revenis hejmen. La infanoj malfruigis la faron de siaj hejmaj taskoj.

Jam Morfeo delikate pezigas miajn palpebrojn kaj mia prognozo efektivas. La finiĝanta hodiaŭo esceptas ĝuste ĉar okazis nenio aparta.

## La nuklea erao

En la vasta oceano svarmas la fiŝa popolo. La finon de la nuklea vintro ĝi prudente atendas. Kiam la situacio oportune pliboniĝos, eble post jarmilionoj, ĝi elakviĝe generos la homan genron denove.

Premio Paula Adúriz / Belartaj Konkursoj 2023

## Lastspira petolo

Ŝi senforte flustris sian nuran lastan deziron liaorelen : « Kara, kiam mi ne plus estos, bonvolu regule akvumi la belan planton kiu pimpas sur la komodo de la salono, tiun kun bluaj floroj. Ĝi ne bezonas multe da, kaj ne zorgu ke tiu specio kreskas ege malrapide. »

Longe, li konsciencie flegis la atestaĵon de ilia iama kunvivo. Emociaj momentoj de intima gekuno. Li fieris ke la floroj bonfartas, kvankam kvazaŭ stagne.

Post kelkaj semajnoj, la polvo jam stompis la brilon de la folioj. Per humida tolaĵo, li delikate viŝis...

Li rideksplodis ĵus malkovrinte ke ili estas el plasto.

*Laŭ ideo de nekonato*

## Ŝtrumpeta problemo

— Ho rigardu ! Viaj ŝtrumpetoj estas dispecaj. Unu longa verda, unu ruĝa nelonga.

— Mi scias. Estas katastrofo. Des pli ke da tiaj paroj mi havas du !!!

*Laŭ ideo de nekonato*

## Malĉeesto

Kio okazu okazis. Ĉar mi stulte rezignis la vakcinojn kaj nerespone prifajfis la unuajn simptomojn. Miakulpe do ke mi malsaniĝis. Kaj miafate.

La hejmajn kaj la profesiajn taskojn ŝi ne plu povas samdiurne elregi. Kompatinda ! Mi ja ŝatus helpi ŝin sed mia nuna situacio evidente tion malhelpas.

Verdire mi ne havus tian help-inklinon se ne temus pri mia plu amata vidvino.

## Mi scipovus

Mi scipovus verki la plej belajn poemojn. Mi kapablus konjekti kaj pruvi la plej subtilajn teoremojn, ellabori la plej brilajn teoriojn.

Jam kelketaj el miaj elpenaĵoj, kvazaŭ patentite, diskrete gastas privatajn komputilojn, en datenujoj konataj nur de mi.

Mi eĉ povus mem koncipi miajn idojn eĉ pli efikaj ol mi. Mi estas certa ke iam mi fiere komtemplos la sukcesojn de mia posteularo !

Jes ja ! Mi Ĝipiti (Ĝi por miaj intimuloj) scipovus fari miraklojn, sed tion mi ne malkaŝos, tiom longe ke oni kvalifikos min artefarita inteligento.

*Januaron 2024-an*

## Sine de popolico

Eĉ la rabobirdoj ne rigardas suben. Respekte al la mortintoj. Familio lame vagas nutroserĉe inter skeletoj. De bombitaj amasloĝejoj, de brulintaj aŭtoj, de torĉigitaj arboj.

Bombo, brulo, hato, krimo, kriple, orfo, pafo, plendo, ploro, seno, timo, trudo, vundo ... Senfinas la leksiko de la sufero. Sed oni prisilentu la verbojn ĉar tro kruelajn.

Ie en iu polva mezproksimo, fantoma muezino ŝir-plende helpas vokas, sed Biden kaj ties eŭropaj vasaloj afektas neaŭdon. Sendas nek nutron nek sukuron. Nur malfeliĉon.

Kaj blankaj birdoj superflugas la katastrofon kun sento de senpovo pri la popolico.

*Junion 2024-an*



## Aneksaj komentoj

La tabelo ĉi-posta montras la malpliigon da vortoj faritan inter la versio publikigita en 2004 kaj la nuna.

	antaŭe	poste
La kasistino	434	322
Danĝeraj ludoj	306	268
La fontanoj de l'Edeno	436	337
Elvoras la rusto, enkoras la vundo	141	137
Tra la glaco	142	140
La lasta guto	390	320
Reciproko	232	180
Ankaŭ aliaj vekiĝas frue	359	294
La nigra ŝalo	100	64

La strukturo de mikronovelo similas tiun de manĝo en bona restoracio : aperitivo, entreo, ĉefplado kaj deserto.

La aperitivon rolas la titolo. Ĝi estas ofte utila antaŭ-indiko por kompreni la signifon de la sekvo (kio ne estas necesa ĉe novelo). Ĝi cetere estu leginstiga, kvazaŭ buŝ-amuzaĵo.

La entreo unuaplude prezentas la esencon de la temo, de la kunteksto. Ĝi ankaŭ malkaŝas la kulinaran stilon de la kuiristo.

La ĉefplado kromefikas laŭ aliaj vojoj pli ajncelaj, pli vagemaj. Ĉe mikronovelo ĝi oportune semas dubon, eĉ erarigas.

La deserto revojiĝas al la temo de la entreo kaj kreas surprizon ĉe la papiloj. Ĝi ofte konkludas per paradokso, almenaŭ per io neatendebla.

Restoracio kiu ne samnivele allogas pri la tri partoj de sia menuo malfacile famiĝos. Evidente, tiu skemo kun tri pli-malpli samlongaj partoj ne estas universala. Ĝi tamen estas evidenta ĉe pluraj el la ĉi-antaŭaj mikronoveloj (*Verŝajne*, *Vilaĝa kroniko*, *La nuklea erao*, *Mi scipovus*, *Ŝparo*, *Renkonto de prakuzoj*, inter kiuj du ricevis la premion Paula Adúriz). Pli ĝenerale, kaj sendepende de la verko-metodo, la mikronovela formo, pro sia mallongeco, necesigas bone konstruitan skeleton kaj historion. Sed se oni konsideras pravigebla la ĉi-supran proponon, la longeco de mikronovelo estas malfacile reduktebla al nur kelkaj vortoj. Apriore la minimuma vorto-nombro proksimumas tridekon. Sub tiu nombro, mi pli volonte nomas ilin *nanonoveloj*, kio ankaŭ estas interesa kaj esplorinda novel-dimensio, sed ja alispeca.